# Alvoko por la deka Ordinara Laborperiodo de la Nacia Asembleo de Popola Povo




Havano, nov 22 (RHK) La prezidento de la Nacia Asembleo de la Popola Povo (Nacia Parlamento), Juan Esteban Lazo Hernández, uzante la povojn donitajn en la artikolo 111, subsekcio c), de la Konstitucio de la Respubliko, kunvokis la Dekan Ordinaran Sesiperiodon  de la Nacia Asembleo de Popolpovo en sia IX Le?dona periodo.

La sesioj okazos ekde 9:00 a.m. la 12-an de decembro de la kuranta jaro, en la Havana Kongresejo.

"Sciigu la deputitojn de la Nacia Asembleo de Popola Povo, la agentejojn de la Centra ?tata Administracio kaj aliajn respondajn instancojn kaj a?toritatojn. Publikigu ?in en la Oficiala Gazeto de la Respubliko kaj en aliaj amaskomunikiloj por ?enerala scio”, instruas la alvoko.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/305708-alvoko-por-la-deka-ordinara-laborperiodo-de-la-nacia-asembleo-de-popola-povo

**Radio Habana Cuba**